**Gasodukta projekto implicas politikajn problemojn**




27a jarkolekto - januaro 2006/1

# Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijks - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X




## Unua fotografaĵo de ekstersunsistema planedo



## Eŭropo plialtigas sian drataron



## TUMULTOJ EN FRANCIO:

# Signalo, ankoraŭ ne revolucio


www.retbutiko.net

# Stefan Maul

# El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de Monato




En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Prezo: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio
Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

## Signalo, ankoraŭ ne revolucio

9



La 8an de novembro la prezidanto de la Franca Respubliko, uzante leĝon de 1955, dekretis „la esceptan staton sur la metropola teritorio” (t.e. sur la eŭropa parto de Francio). Tiun leĝon starigis la franca registaro de Edgar Faure en Alĝerio, kiam ĝi kontraŭbatalis la manifestaciojn antaŭ la sendependiĝo de la lando. Tian dekreton konis ankaŭ la geavoj en Francio, pro la invado de la germanaj armeoj. Sed eĉ dum majo 1968 la tiama registaro ne uzis ĝin. Francoj konis tian dekreton de franca registaro nur dum la revolucio de 1871, la Pariza Komunumo. Ĉu do okazas nun en Francio nova revolucio?

11



## Eŭropo plialtigas sian drataron

Fine de 2005 mortis kvar homoj pro kugloj en la nord-afrika urbo Sebto dum sturmo de 500-600 enmigremuloj al la duobla pikdrataro ĉirkaŭanta la urbon. La 6an de oktobro marokaj ĝendarmoj pafmortigis aliajn ses, kiuj klopodis transsalti la drataron de Melilo, la alia hispana kolonio en Nord-Afriko. Dum deko da tagoj la salt-atakoj fare de centoj da afrikanoj fariĝis ĉiunoktaj kaj en diversaj okazoj dekoj da homoj, eĉ 350 samtempe la 2an de oktobro, sukcesis eniri en la hispanajn posedaĵojn, taksatajn la pordo de Eŭropo kaj bileto al malpli manka vivo.

## Gasodukta projekto implicas politikajn problemojn

16

La 8an de septembro 2005 naskiĝis nova projekto, pri kiu interkonsentis la ŝtatestroj de Rusio kaj Germanio: balta gasodukto. La gasodukto, kies konstruo kostos ĉirkaŭ 5,7 miliardojn da usonaj dolaroj kaj kiu ekfunkciu en 2010, al okcidenta Eŭropo kapablos liveri ĉirkaŭ 55 miliardojn da kubaj metroj da natura gaso.

22

## Unua fotografaĵo de ekstersunsistema planedo



Novaj bildoj montras la unuan planedon ekster nia sunsistemo, kiu estis bildigita, laŭ Gael Chauvin, skipestro kaj astronomo de la Eŭropa Suda Observatorio (ESO).

POLITIKO

**Niĝerio** ........ 8
Ventroj malplenaj
**Militismo** ........ 8
Post kraŝo leviĝas esperoj
**Francio** ........ 9
Signalo – ankoraŭ ne revolucio
**Nordo-sudo** ........ 11
Eŭropo plialtigas sian drataron
**Genocido** ........ 13
Krimo forgesita
**Internaciaj rilatoj** ........ 14
Mara koŝmaro

EKONOMIO

**Energio**
Litovio volas esti nukle-energia ŝtato ........ 15
Gasodukta projekto implicas politikajn problemojn ........ 16

MODERNA VIVO

**Niĝerio** ........ 18
Duobla tragedio
**Ĉinio** ........ 18
Kun siaspeca spaco
**Internaciaj rilatoj** ........ 19
Tranĉilo ideologia
**Niĝerio** ........ 20
Forpasi, elspezi
**Litovio** ........ 20
Profitoj, pasportoj kaj prostituado
**Japanio** ........ 21
Vendejen!
Tro vivi foje ne bonas

SCIENCO

**Astronomio** ........ 22
Unua fotografaĵo de ekstersunsistema planedo

LIBROJ

**Inda kontribuo el la rusa literaturo** ........ 24
**La plej populara libro de la lastaj jaroj** ........ 25

NOVELO

**La revo pri cirko** ........ 26

**Abonoj** ........ 4
**Enkonduko** ........ 5
**Leteroj** ........ 6
**El mia vidpunkto** ........ 7
**Anoncetoj** ........ 27

# Kiel pagi vian abonon de MONATO?

## ► Rekte al la eldonejo ...

•Per via FEL-konto.

•Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.

•El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.

•El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank, 1000 Brussel.

•El Usono per ordinara usona ĉeko.

•Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al financo@fel.esperanto.be.

•Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

•Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.

•Per **bank**ĉeko tratita je **belga** banko en **eŭroj.** Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

## ► Tarifoj

| Ŝtato de la paganto | | MONATO | | La Jaro aere | |
|---|---|---|---|---|---|
| | | surface | aere | 1 fojon monate | tuj |
| Argentino | EUR | 23 | 25 | 5 | 10 |
| Aŭstralio | AUD | 82 | 90 | 9 | 17 |
| Aŭstrio | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Belgio | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Brazilo | EUR | 23 | 25 | 5 | 10 |
| Britio | GBP | 32 | 35 | 4 | 6,5 |
| Bulgario | EUR | 23 | 25 | 5 | 9 |
| Ĉeĥio | EUR | 30 | 34 | 5 | 9 |
| Danio | DKK | 345 | 375 | 40 | 70 |
| Estonio | EUR | 23 | 25 | 5 | 9 |
| Finnlando | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Francio | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Germanio | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Germanio orienta | EUR | 41 | 45 | 5 | 9 |
| Grekio | EUR | 41 | 45 | 5 | 9 |
| Hispanio | EUR | 41 | 45 | 5 | 9 |
| Honkongo | EUR | 41 | 42 | 5 | 10 |
| Hungario | EUR | 23 | 25 | 5 | 9 |
| Irlando | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Islando | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Israelo | EUR | 41 | 42 | 5 | 10 |
| Italio | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Japanio | JPY | 6600 | 6900 | 860 | 1220 |
| Kanado | CAD | 73 | 78 | 9 | 15 |
| Kipro | EUR | 30 | 34 | 5 | 9 |
| Koreio | EUR | 41 | 42 | 5 | 10 |
| Kroatio | EUR | 23 | 25 | 5 | 9 |
| Latvio | EUR | 23 | 25 | 5 | 9 |
| Litovio | EUR | 23 | 25 | 5 | 9 |
| Luksemburgo | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Malto | EUR | 30 | 34 | 5 | 9 |
| Nederlando | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Norvegio | NOK | 370 | 430 | 45 | 71 |
| Nov-Zelando | NZD | 93 | 99 | 9 | 18 |
| Pollando | PLZ | 99 | 110 | 22 | 36 |
| Portugalio | EUR | 36 | 41 | 5 | 9 |
| Rusio | EUR | 23 | 25 | 5 | 9 |
| Singapuro | EUR | 41 | 42 | 5 | 10 |
| Slovakio | EUR | 23 | 25 | 5 | 9 |
| Slovenio | EUR | 30 | 34 | 5 | 9 |
| Sud-Afriko | EUR | 41 | 42 | 5 | 10 |
| Svedio | SEK | 430 | 465 | 49 | 84 |
| Svislando | CHF | 71 | 82 | 9 | 14 |
| Tajvano | EUR | 41 | 42 | 5 | 10 |
| Usono | USD | 61 | 63 | 8 | 13 |
| Bazo eŭropa | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Bazo ekstereŭropa | EUR | 48 | 50 | 5 | 10 |

Aliaj landoj: Petu la tarifon de la landa peranto, aŭ, se tiu ne ekzistas, de la eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Telefono +32 32 34 34 00; telekopiilo +32 32 33 54 33.

## ► aŭ pere de peranto ...

•**Aŭstralia:**Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: esperfed@ans.com.au.
•**Aŭstra:**Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
•**Belga:**Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
•**Brazila:**Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
•**Brita:** David Kelso, 5 Craigenhill Road, Kilncadzow, CARLUKE ML8 4QT, Tel 01555 759 166. Reto: davidekelso@yahoo.co.uk
•**Ĉeĥa:**Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ČEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnicky@quick.cz.
•**Dana:**Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
•**Estona:**Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hot.ee.
•**Finna:**Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: afoficejo@esperanto.fi
•**Franca:**Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
•**Germanaj:**
•Hilde Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (banko: LIGA Augsburg 113514, BLZ 750 903 00). Reto: s.h.maul@t-online.de.
•Literatura-Servo "Espero", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schweringen (Volksbank Grafschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo.ESPERO@t-online.de.
•Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
•Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de
•**Hispana:**Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@Esperanto-ct.org.
•**Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakats u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@pro.hu.
•**Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
•**Irlanda:**Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
•**Islanda:**Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
•**Itala:**Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
•**Japanaj:**
•KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Osaka-hu 561. Reto: kleg@mvf.biglobe.ne.jp.
•Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. jei@mre.biglobe.ne.jp.
•**Kanada:**Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwolemskatl@shaw.ca.
•**Kataluna:**Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@Esperanto-ct.org.
•**Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmuro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperant@unitel.co.kr
•**Kostarika:**Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miauguau@racsa.co.cr
•**Kroata:**Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
•**Latva:**Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
•**Litova:**Laimius Straźnickas, a.k. 1469, LT-10009 Vilnius-40, Litovio. Reto: stralaim@takas.lt.
•**Luksemburga:**LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
•**Nederlanda:**UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
•**Norvega:**Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
•**Nov-Zelanda:**G. David Dewar; 4 Harlech Mews, Christchurch 8004. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
•**Pola:**Skribu al la eldonejo kaj pagu al Danuta Leyk, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328@PKO BP XIV O/Wwa.
•**Ruslandaj:**
•Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
•Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.81 0.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
•**Sud-Afrika:**Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
•**Svedaj:**
•Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
•Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, S-242 94 Hörby. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
•**Svisa:**Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
•**Usona:**ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org
•**Venezuela:**Peter Jaimez, Apartado 3482, Caracas 1010A. Reto: peterjaimez@tutopia.com.

www.monato.net

**Monato**, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 27a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el Monato nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de Monato por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

*Verantw. uitgever:* Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

**eldonejo:**

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33; retpoŝto: monato@fel.esperanto.be, Skype-telefono: fel-monato; valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinktita en la eldonejo.

**ĉefredaktoro:**

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: s.h.maul@t-online.de

**reviziantoj:**

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts,
Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Shlafer.

**redakcia sekretario:**

Paul Peeraerts.

**grafiko:**

Ferriol Macip i Bonet.

**redaktoroj:**

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Reto: moonmont@pt.lu.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Reto: rotsaert@esperanto.be.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 59, B-4700 Eupen, Belgio. Reto: jp@fel.esperanto.be.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: Evgeni.Georgiev@gmx.at.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: edmund820@rano.org.
- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: monato-leteroj@fel.esperanto.be.
- **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: kolker@stratos.net. **Noto:** Librorecenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Yamasaki Seikô, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: syama@qf6.so-net.ne.jp.
- **Medio:** Maritza Gutierrez Gonzalez, Avellaneda 212, e. Gertrudis y Josefina, 10500 Habana, Kubo. Rete: mgglez@enet.cu.
- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: paulgubbins@tiscali.co.uk.
- **Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, Rua Jãoa Motter 98, 81210-260 Curitiba, PR, Brazilo. Rete: gmattos@brturbo.com.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: paulgubbins@tiscali.co.uk.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St .#3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: teccardt@hotmail.com
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: gerrit.en.madzy@planet.nl.
- **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: grigorij@lenta.ru.
- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: s.h.maul@t-online.de.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: Evgeni.Georgiev@gmx.at.

ENKONDUKO



# Kancelierino

Tra Germanio iras nova sento: Por la unua fojo la landon regas virino! Tio sendube estas grava cezuro en la historio de tiu ĉi ŝtato. Angela Merkel, partiestro de kristandemokratoj, nun estas ĉefa registo de Federacia Respubliko Germanio. Angela, cetere, signifas „anĝelo"; ĉu ŝi estos anĝelo por la lando, tion ni vidos. Laŭ la konstitucio ŝi havas la ofic-titolon „federacia kanceliero" (germane: *Bundeskanzler*). Sed la protokol-ofico en Berlino decidis (certe laŭ postulo de Merkel), ke la ĝusta titolo estas „*Bundeskanzlerin*" (federacia kancelierino), analoge al „ministrinoj", kiujn la lando havas jam dekomence. Por sia unua vizito al eksterlando Merkel elektis Parizon, kaj eĉ la francoj obeis al la germanaj kolegoj kaj titolis ŝin ne „Sinjorino la Federacia Kanceliero", kiel postulus la franca lingvo, sed salutis ŝin kiel kancelierinon.

Sed kiel ni procedu en Esperanto, ekzemple en nia revuo? Ĉu ankaŭ nia protokolo postulas skribi „kancelierino"? La germana *Bundeskanzlerin* estas relative facile prononcebla, almenaŭ por germanoj. En la lingvo internacia jam por la vorto „kanceliero" oni bezonas iom da ekzerco por ĝuste prononci. Sed „kan-ce-li-er-ino" estas vere langorompa, ĉu ne? Mi kompatas niajn komplezajn helpantojn, kiuj ĉiumonate voĉlegas la revuon por blinduloj!

Bonŝance pri ŝia nomo ni ne havas problemon, ĉar oni prononcas ĝin same en la germana lingvo kaj en Esperanto (sola diferenco: en la germana la akcento troviĝas sur A). Do ni ne devas aldoni prononcindikon. Germanoj, cetere, jam havas karesnomon por ŝi: Angie. Sed atentu, oni ne prononcas ĝin germane „angi"! Germanoj, adorantoj de la angla lingvo, diras „ejnĝi". (Kiel prononcas franclingvanoj?) Do eble elturniĝo por nia revuo estus skribi pri „kanceliero Ejnĝi". Kion vi opinias? D-ro (aŭ d-rino?) Merkel laŭprofesie estas fizikisto – aŭ ĉu ankaŭ ĉi-okaze ni devas skribi „fizikistino"? Kiaj neatenditaj problemoj nur pro tio, ke virino regas Germanion ... Cetere, anĝeloj laŭdifine ne havas sekson, do tutcerte ni ne devas diri Anĝelino Merkel.

Sincere via

Stefan Maul

## Paciginto

Kelkajn tagojn antaŭ la 30-jariĝo de la morto de generalo Franco [franko], la 20an de novembro, aperis en la itala ĵurnalo *Corriere della Sera* intervjuo al Manuel [manŭél] Fraga, eksministro pri propagando de la hispana diktaturo, fondinto kaj prezidanto de la dekstrisma Popola Partio kaj dum jaroj prezidanto de Galegio. En ĝi li taksas la diktatoron „paciginto”. Ne eblas pli kruele malĝusta aserto por la stariginto de 40-jara faŝisma reĝimo per fiaska armea puĉo, kiu transiris al tri-jara milito (1936-1939). La milito mem, kaŭzita de la puĉintoj, rekte mortigis centojn da miloj da homoj.

La malantaŭfrontajn politikajn murditojn de la faŝistoj en tiu periodo oni kalkulas je 100 000, al kiuj aldonendas pliaj 50 000 ekzekutitoj ĝis 1945. Kromaj 270 000 estis enkarcerigitaj kaj 400 000 fuĝis eksterlanden por eviti la teroron. La sanga subpremado kaj politika teroro ne limiĝis al la unuaj jaroj de la faŝisma reĝimo, ĉar la diktatoro subskribis mortokondamnojn al politikaj malliberuloj laŭlonge de sia tuta reg-periodo, eĉ en la mortolito. Paciginto? Certe, male.

Laste, dirindas, ke post 30 jaroj la hispana registaro plu ŝuldas honorigon al la batalintoj por la tiama demokratia registaro kontraŭ la puĉintoj, kaj al la reprezalitoj: murditoj, malliberigitoj, maldungitoj kaj priŝtelitoj de iliaj posedaĵoj. Kaj ne nur honorigon, ĉar multaj el tiuj posedaĵoj restas ankoraŭ ne redonitaj.

Hektor Alos i Font

*Katalunio*

## Redaktoroj supozas tro

En Monato 2005/4, p. 6, Bjørn A. Bojesen plendis pri la uzo de latinlingvaj esprimoj en *supozeble* esperantlingva magazino. Bedaŭrinde en Monato 2005/9 daŭris tia supozo pri jamaj scioj de la leganto:

Unue. La artikolo pri lingvoj en Andrapradeŝo (p. 21) ne klarigis, en kiu lando/mondoparto estas ĉi tiu loko.

Due. La artikolo pri nomoj (p. 22) forlasis la kutimon de Monato montri familiajn nomojn majuskle, ĝuste tie, kie ĝi nepras por kompreni la ekzemplojn de nomoj.

Trie. La sama artikolo uzis la franclingvan esprimon *par excellence* sen klarigo kaj sen ia kialo salti el Esperanto.

Ni legas Monaton por informiĝi pri aliaj landoj kaj kulturoj, do bonvolu ne supozi, ke ni jam scias pri ili.

Vilĉjo Walker

*Britio*

## Nazia influo kaj germana ekspansio

Gerrit Berveling en la artikolo *Nia estonta Eŭropo* ..., Monato 2005/9, p. 8, rakontas pri ĉikanoj fare de germanaj kaj polaj doganistoj kontraŭ instruistoj parolantaj pri rasismo. Estas eble, ke tiuj doganistoj agis sub nazia influo. Laŭ la dana libro *Blod og Ære* (Sango kaj honoro) de Ole Linboe kaj laŭ mia sperto troviĝas multaj nazioj en policaj instancoj. Aboutaleb ne malpravas. Mi kuraĝas diri pli: Kreskanta influo de nazioj povos kaŭzi realan katastrofon en Eŭropo.

La germana popolo sub la gvidado de Adolf Hitler spertis la plej grandan katastrofon en sia tuta historio. Hitler asertis, ke la ŝtato kreita de li daŭros 1000 jarojn, sed ĝi daŭris 12 jarojn kaj sekvis nuligo de 1100-jara germana ekspansio orienten. La germana ekspansio ne nur estis militada, sed ĉefe ekonomia, kultura kaj demografia. La strebo de germana influo ampleksis centran kaj orientan Eŭropon kaj krome grandan parton de Azio. La germana lingvo nomiĝis „Esperanto de slavoj”. Indos prilumi la influon de naziismo al la multetnaj socioj en orienta Eŭropo.

Ni lernu de la historio, ni ne falsu ĝin.

Aleksander Kiersz

*Danio*

## Speciala homa rajto

Dum mi atente legadis la artikolon *Vera homo* de Sefan Maul (Monato 2005/5, p. 7) mi haltis ĉe lia aserto pri tre konservativaj opinioj de Johano Paŭlo la 2a: „Por virinoj ne validas la homaj rajtoj”. Ĉu estas speciala homa rajto sacerdotiĝi en la katolika eklezio? De kio devenas tia rajto?

Origino de tia homa rajto ne troveblas en la katolika tradicio nek en la Nova Testamento. En la Nova Testamento legeblas plurloke: „Ne vi elektis min, sed mi elektis vin.” Tial al neniu, ĉu viro aŭ virino, apartenas la homa rajto sacerdotiĝi.

Episkopo benas per mansurmeto la alvokiton al ekleziula posteno. Ĉu tiu mansurmeto simbolas misteran komenciĝon de sacerdotecaj homaj rajtoj? Ekleziulo kiel homa estulo jam posedas ĉiujn homajn rajtojn. Kion esence plian aldonas la episkopa beno al ili?

Armando Zecchin

*Italio*

## Subteno al la brita registaro

En Monato 2005/7-8, p. 10, mi legis interesegan artikolon de Paul Gubbins pri lasta voĉdonado kaj maltaŭgeco de la brita elekta sistemo. Mi tute samopinias kun li. Mi volis nur precizigi unu aserton de li por pli pravigi la aŭtoron. Laŭ li, voĉdonis nur 61 % de la balotrajtigitoj kaj la venkinta Laborista Partio rikoltis 36 % de la voĉoj. Se tio estas vero, ne estas ĝuste, ke „apogas la registaron nur kvarono de la brita popolo”, sed matematike eĉ sufiĉe malpli, tio estas nek duono nek triono nek kvarono, sed inter kvinono kaj kvarono. Kompatinda maldemokratio!

José Salguero

*Hispanio*

**Kiel sendi viajn leterojn?**




**Sendu viajn leterojn por tiu ĉi rubriko al:**

**Flandra Esperanto-Ligo, Monato**
**Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen Belgio**
**Telekopiilo: + 32 3 233 54 33.**
**Retpoŝte: monato-leteroj@fel.esperanto.be**

**Pri la enhavo de la leteroj respondecas la aŭtoroj mem. La redaktanto havas la rajton mallongigi leterojn. Reagoj al aperintaj artikoloj havas prioritaton.**

# Katastrofo en Irako



de Stefan Maul

Intertempe ankaŭ la usona popolo mem plimulte kontraŭas la militon de sia registaro kontraŭ Irako. Estus nun facile kaj loge por tiuj inter ni, kiuj jam antaŭmilite avertis, ke neniu el la argumentoj prezentitaj de Vaŝingtono por invado estis vera, kaj ke ĝi nepre kondukos al fiasko kaj katastrofo, kun triumfo diri retrorigarde: „Nun vi vidas, ke ni pravis! Estas katastrofa fiasko!" Tia triumfo ne konvenas, ĉar ni tiam ne admonis kaj avertis por ĉikani la usonan registaron, sed ĉar ni timis, ke la dum jardekoj suferinta iraka popolo per tia milito devos elteni pliajn, aliajn suferojn.

Bedaŭrinde ĝusta estis ankaŭ nia prognozo, ke eĉ post sukceso usona (do la forpelo de despoto Sadam Husajn [sadám husájn]) la landon terurigos intercivitana milito; certe, la okupaciaj trupoj preferas paroli pri terorismo, sed fakto estas ke inter du malamikaj islamaj grupoj (sunaistoj kaj ŝijaistoj) furoras sanga batalo, pro kiu preskaŭ ĉiutage mortas dekoj da senkulpaj homoj. La malmultaj usonaj soldatoj ne *povas* malhelpi tiujn sangajn batalojn – jen la evidenta, kompleta fiasko.

## Protekto ne eblas

La usonaj trupoj ne nur ne povas protekti la irakan loĝantaron, ili ankaŭ ne komplete povas protekti sin mem, spite al sia bonega ekipaĵo. Kiam en aŭtuno pasintjara mortis jam la dumila usona soldato per memmortiga atenco, tio estis signalo por vastaj partoj de la usona socio, definitive ne plu fidi al sia prezidanto George W. Bush [ĝorĝ dablju buŝ], kiu obstine asertas, ke li defendas la usonan liberecon en Bagdado. Sufiĉis jam la mensogoj kaj skandaloj pri kaj pro tiu milito. Kiam li antaŭ la invado asertis, ke li havas klarajn pruvojn, ke Sadam disponas pri amas-detruaj armiloj, ni avertis, ke tiaj pruvoj ne ekzistas, male. Intertempe ni scias, ke la sola fonto, pri kiu disponis tiutempe la usona registaro, estis tre nebula atentigo de (ĝuste!) germana sekreta servo, ke perfidulo iraka rakontis, ke la despoto havas tiajn armilojn. Sed la germana sekreta servo aldonis: la atestanto estas tute nekredinda. Kial tamen oni transdonis tiun informon al aliaj, do ankaŭ usonaj sekretaj servoj? Probable la germanoj ne volis poste rikolti riproĉojn, se tamen la aserto estus vera. La germana registaro reagis konsekvence kaj ne kredis nekredindan asertanton, Bush kaj kompanoj simple ignoris la averton pri nekredindeco.

## Krimaj metodoj

Aldoniĝis pluraj skandaloj, kiel la malhumanaj torturoj en karcero en Bagdado fare de usonaj soldatoj (kaj soldatino), mensogoj pri provo de Sadam akiri atomarmilojn en Niĝerio kaj, lige al tio, malkovro de kontraŭleĝaj metodoj de la usona sekret-servo CIA, fine eĉ raportoj pri torturejoj de CIA en pluraj aliaj landoj, kien oni kaŝe transportis onidirajn teroristojn. Aparte tikle en tiu kunteksto estas, ke ĝuste en Germanio, kiu dekomence kontraŭis la Irak-militon, troviĝis centralo de tiuj kontraŭleĝaj aviad-transportoj. Sekve ne nur plimulto de la usona loĝantaro sed ankaŭ gravaj politikistoj, kiuj antaŭe subtenis la prezidanton, nun postulas retiri la usonajn trupojn el Irako.

Sed ĉu tia retiriĝo solvus la problemojn? Tute ne. La katastrofa situacio, la intercivitana buĉado daŭrus. Sed ankaŭ se la trupoj restus, restus la katastrofo. Krom forpeli despoton, Bush atingis neniun el siaj celoj. Paco? Iluzio. Demokratio? Jes, kelkaj formalaj kriterioj ekzistas (konstitucio, elektoj), sed estas pseŭda demokratio. Eksa ĉefministro de Irako, kiu „regis" la landon post falo de Sadam, nun diras: „La homoj agas same kiel dum la epoko de Sadam, kaj pli terure." Demokratiigo de Irako estu, laŭ Bush, signalo kaj impulso ankaŭ por aliaj landoj en Proksima Oriento, por enkonduki demokration. Neniu el tiuj ŝtatoj moviĝas eĉ milimetron en direkto al demokratio.

## Detruita reputacio

Ne malpli terure estas, ke Bush – neglektante internacian juron kaj Ĉarton de Unuiĝintaj Nacioj – mem detruis sian reputacion kaj tiun de Usono, la pioniro de libereco kaj demokratio. Bush, kiu per tiu invado en Irako fariĝis milit-krimulo, perdis ĉian subtenon, nacian kaj internacian. Nun, ekzemple, ses el dek germanaj civitanoj opinias, ke usona gvidado de la mondo estas „nedezirinda". Kia malbona perspektivo!

En tiu ĉi multobla dilemo estas minimume du tre kompatindaj popoloj: la iraka, kiu falis de unu mizerego en alian, kaj la usona, kiu blinde sekvis manian prezidanton kaj nun (kiel ajn malfrue) devas konstati, kiom li trompis siajn civitanojn. Tamen li ne suferos la sorton de Sadam. Li ne riskas esti forpelata. Post du ofic-periodoj li ne povas denove kandidati por prezidanteco. Ne multe gravas, ke la homo Bush abdikas. Pli terure estas, ke Usono, protagonisto de libereco kaj demokratio, sola restinta grandpotenco, ne plu kapablas plenumi sian taskon energie gvidi la liberan parton de la mondo. Sekvojn de tiu ĉi potenc-vakuo ni ne povas prognozi. ■



NIĜERIO

# Ventroj malplenaj

Almenaŭ vortojn disponigis la registaro niĝera al sia popolo, frontanta al malsatego. Laŭ prezidanto Tandja Mamadou, la lando ne konas malsaton. Male: „La homo devas labori, antaŭ ol akiri fortojn”, diris la prezidanto, neglektante krizon, afliktantan la landon ekde majo 2005 kaj kaŭzitan de longa nepluva periodo kaj de insektoj, kiuj formanĝis rikoltojn.

Tamen post tiel nomata ĝenerala deklaracio politika pri la malsato, lanĉita de la ĉefministro Amadou Hama ĉe la nacia asembleo, finfine venis nutraĵoj kaj financaj subvencioj al Niĝero. Helpis diversaj internaciaj organizaĵoj, inkluzive de Unicef, kies ĉef-administranto en Niĝero Alain Balandi direktis la donacojn precipe al virinoj, mamnutrantaj siajn idojn. Ankaŭ la franca registaro donacis pli ol 200 000 eŭrojn.

Florent CLUSE/pg

MILITISMO

# Post kraŝo leviĝas esperoj



*La piloto de la rusa ĉasaviadilo, Valerij Trojanov, estis arestita sed poste liberigita.*

*Ĉe la kraŝloko oni trovis multekostan kaj sekretan rusan rekonilon de fremdaj ĉasaviadiloj.*



Pasintjare kraŝis en Litovio 50 km for de Kaunas rusa ĉasaviadilo de la marko SU-27. La piloto, 36-jaraĝa Valerij Trojanov, sin savis, kiam ne plu restis brulaĵo kaj akcidento neeviteblis. Trojanov estis arestita pro delikto kontraŭ la regularo pri internaciaj flugoj, sed post du semajnoj da enketoj liberigita.

La apero de rusa aviadilo, ekipita per kvar raketoj kaj unu kanono, sur la teritorio de membroŝtato de Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO), ŝokis estrojn kaj de Litovio kaj de NATO mem. Unue, post zorgaj esploroj ĉe la akcidentejo, kie estis trovita inter la rompitaĵoj sekreta instalaĵo pri rekono de militaj aviadiloj, la instancoj kredis, ke temas pri testo flanke de la rusoj por esplori la defendo-pretecon de litovaj kaj aliaj ĉasaviadiloj.

### Teknike senriproĉa

Poste estis decidite, ke la rusa ĉasaviadilo elaeriĝis pro pilota eraro: esplorado de la t.n. „nigra kesto” indikis, ke la maŝino estis teknike senriproĉa, tamen antaŭ la flugo ne estis sufiĉe inspektita. Ŝajnas, laŭ rusaj oficiroj, ke la aviadilo kun ses aliaj forlasis bazon apud Sankt-Peterburgo, rondumis super la maro apud la dana insulo Bornholm sed, anstataŭ reveni kun la aliaj al Kaliningrado, deflankiĝis kaj troviĝis super Litovio.

La okazintaĵo por litovaj aŭtoritatuloj altrudas la esperon, ke Rusio analizos la incidenton kaj estonte eliminos ŝtatlimajn deliktojn tiajn. Samtempe politikistoj ekzorgos pri la neceso fortigi la defendeblon de la aero super la baltaj ŝtatoj: pro tio ili diskutos kun gvidantoj de NATO kaj de Rusio.

Ekis ankaŭ ideoj pri la senarmigo de la kaliningrada enklavo, eta sed forte armeplena rusa teritorio.

LAST/pg



# Signalo – ankoraŭ ne revolucio

**La 8an de novembro la prezidanto de la Franca Respubliko, uzante leĝon de 1955, dekretis „la esceptan staton sur la metropola teritorio" (tio estas sur la eŭropa parto de Francio). Tiun leĝon starigis la franca registaro de Edgar Faure [edgár for] en Alĝerio, kiam ĝi kontraŭbatalis la manifestaciojn antaŭ la sendependiĝo de la lando. Tian dekreton konis ankaŭ la geavoj en Francio, pro la invado de la germanaj armeoj. Sed eĉ dum majo 1968 la tiama registaro ne uzis ĝin. Francoj konis tian dekreton de franca registaro nur dum la revolucio de 1871, la Pariza Komunumo. Ĉu do okazas nun en Francio nova revolucio?**

La unuajn tumultojn estigis la morto de du junuloj el pariza antaŭurbo. Por eviti policanojn, ili provis sin kaŝi en mortigan ŝirmejon: alt-tensian transformatoron. Kiel kutime en tiaj aferoj, la diroj de la policanoj kaj tiuj de la aliaj junuloj de la urbo malsimilas.

Sed ĉi-foje Francio konis kvazaŭan revolucion: ĝis 1400 aŭtoj bruligitaj dum unu nokto – post la parolado de la prezidanto – centoj da junuloj enkarcerigitaj, tumultoj ne nur en la ĉefurbo sed rapide en Marsejlo, Liono, Tuluzo, Strasburgo, Saint-Étienne. Norde, sude, ĉiu urbego konis la fajregojn, la alarmojn. ►



*La ministro pri internaj aferoj, Nicolas Sarkozy*





## ► Kanajloj

Notindas, ke kelkajn tagojn antaŭ la tumultoj la ministro pri internaj aferoj, Nicolas Sarkozy [nikolá sarkozí], vizitis nokte la parizan antaŭurbon Argenteuil [arĵantéj], konatan pro ties oftaj malordoj, kaj diris antaŭ televidaj kameraoj, ke li „forbalaos la kanajlojn” kaj „purigos la urbojn per Kärcher” [kerŝer] (marko de akvoŝpruca purigmaŝino).

Sarkozy, dekstrulo kaj rivalo de la prezidanto, sin prezentas kiel iun, kiu parolas kiel la francoj, konas la problemojn de la popolo, kaj scias kiel solvi ĉion. Parolante tiel, li celis kiel kutime paroligi pri li, preparante la venontajn balotojn, sed fakte li blovis sur la fajron en la antaŭurboj.

## Politikistoj

Direndas, ke la antaŭa registaro de ĉefministro Raffarin [rafarén] forigis la subvenciojn de la asocioj, kiuj en tiuj lokoj provas helpi la junulojn. Tiuj asocioj, apogataj de la maldekstraj registaroj, celas nek trovi laboron nek francigi eksterlandanojn aŭ francojn fremd-devenajn. Tamen ili ludas gravan socian rolon, ĉar ili estas la solaj lokoj, kie miloj da gejunuloj, forlasintaj la lernejon kaj senlaboraj, trovas aŭskultemajn homojn. Ili estas ĉefe la pruvo, ke la francaj politikistoj de la lastaj 30 jaroj fiaskis en siaj agadoj pri enmigrado, pri akcepto de eksterlandanoj, pri plenlaboro.

Direndas, ke tiuj antaŭurboj, kie vivas milionoj da francoj, estas nehomaj. En La Courneuve [la kurnév] konstruiĝis post la dua mondomilito turoj, kie loĝas po ĝis 3000 personoj. Proksimaj al tiamaj fabrikoj, ili estis ties dormejoj. Malaperis la fabrikoj en la 1980aj jaroj, sed la estroj de la nova liberala mondo purigis nek siajn uzinojn nek la dormejojn de siaj ekslaboristoj. Pro manko de mono malfacilas zorgi pri tiuj konstruaĵegoj, rapide kadukiĝantaj.

## Homaj rajtoj

Direndas, ke veras la frazo: „Tiuj, kiuj bruligas, estas ofte viroj, junaj kaj el eksterlanda deveno.” Respondendas: „Viroj junaj el eksterlanda deveno ne trovas laboron, ne trovas loĝejon, ne povas eniri dancejon ...” pro la antaŭnomo (Mohamed aŭ Narcisse), pro la koloro de la vizaĝo. Kaj ĉio ĉi en Francio, lando de la homaj rajtoj.

Direndas, ke la francoj provis ĉiujn eblajn politikajn kombinojn dum la lastaj 30 jaroj: maldekstra prezidanto (Mitterrand [miterán]) kun maldekstra parlamento, poste kun dekstra parlamento (ĉefministro Chirac [ŝirák]), poste dekstra prezidanto (Chirac) kun dekstra parlamento, poste kun maldekstra (ĉefministro Jospin [ĵospén]), fine kvazaŭa „registaro de nacia unuiĝo”, dekstruloj kaj maldekstruloj, elektante Chirac kontraŭ la faŝismema Le Pen. Ĉio fiaskis: nek pliboniĝo de la kondiĉoj de laboro, nek de la socia vivo. Malaperas la laboro, malaperas la pensioj.

## Sindikatoj

Homoj vivas en malnovaj kaj aĉaj loĝejoj, sen iu ajn espero pri boniĝo, sen iu ajn espero trovi laboron krom kelkajn aĉajn, sen trovi iun ajn akceptemon en la socio. Kio perdotas por ili? Nenio. Kiu parolas ilianome en la parlamento? Neniu bruna vizaĝo inter la deputitoj. Kiu postulas por ili ĉe la sindikatoj? Neniu bruna vizaĝo ankaŭ tie. Kiu estras la tumultojn? Neniu. Revolucio havas, se ne estrojn, almenaŭ projektojn, idealojn. Revolucio? Ne, nur kolerego.

Kolerego kontraŭ socio, kiu ripetadas afiŝe, televide, radie, rete „aĉetu Nike, Chevignon, Bullrot”, sed ne donas al ili la kapablon akiri tiujn luksajn varojn: sen laboro mankas mono. Kolerego, ĉar kiam ili provas trovi tiun monon, oni punas ilin: evidente, ĉar ŝakrado de drogo, de ŝtelaĵoj restas kontraŭleĝa. Tiuj junuloj ne provas krei novan mondon, ili nur serĉas eniri la reklaman mondon de Nike kaj aliaj. Tiun vivon de facileco, de eterna juneco inter belegaj aŭtoj kaj amindaj virinoj, jen kion ili volas. Ili ne kulpas pro tio: ili estas nur eraroj en nia socio de aĉetemo, de adorado al eterna kreskado de la ekonomio.

## Eksterleĝuloj

Tial la respondo de la franca registaro estas pli bone komprenebla. Antaŭ revoluciuloj oni povas kapti la estrojn, la pensantojn, oni povas eventuale diskuti. Kontraŭ „eraroj” de la sistemo oni devas rapide bremsi la ardojn, obeigi la eksterleĝulojn. Kaj la aliaj ne moviĝu, aŭ ...

La francoj estas antaŭvideblaj por neniu, jam de kelkaj jaroj. Ili sciis forĵeti la eŭropan ekstreme liberalan konstitucion, kontraŭ la volo de preskaŭ ĉiuj francaj politikistoj kaj ĵurnalistoj. Same en Nederlando. Ekster la tradicia politika kampo agas asocioj, novaj fortoj, kiuj planas alian mondon, aliajn solvojn.

## Civilizacio

Evidentas, ke nenia politika solvo funkcios en la nuna sistemo. Dum firmao povas forpeli la laboristojn, kiun ĝi ne plu bezonas, la socio ne povas tiel facile malaperigi la civitanojn, kiuj ne plu havas socian rolon post la malapero de sia laboro. Ankaŭ en Grekio kaj en Belgio samtempe ekbrulis aŭtoj. Francio ne estas izolita problemo, sed nur la unua granda elmontro de la ĝenerala malbona stato de nia civilizacio. La sovaĝa kapitalisma sistemo estas montranta siajn limojn.

Kio okazas en Francio ne estas revolucio, sed nur signalo, ke ĝi povas alveni. Ĉie.

Christian Pinard

NORDO-SUDO

# Eŭropo plialtigas sian drataron



Fine de 2005 mortis kvar homoj pro kugloj en la nord-afrika urbo Sebto dum sturmo de 500-600 enmigremuloj al la duobla pikdrataro ĉirkaŭanta la urbon. La 6an de oktobro marokaj ĝendarmoj pafmortigis aliajn ses, kiuj klopodis transsalti la drataron de Melilo, la alia hispana kolonio en Nord-Afriko. Dum deko da tagoj la salt-atakoj fare de centoj da afrikanoj fariĝis ĉiunoktaj kaj en diversaj okazoj dekoj da homoj, eĉ 350 samtempe la 2an de oktobro, sukcesis eniri en la hispanajn posedaĵojn, taksatajn la pordo de Eŭropo kaj bileto al malpli manka vivo.

Kvankam sturmoj ne estas novaj, ilia plioftiĝo kaj la amasiĝo de la partoprenantoj surprizis la hispanajn aŭtoritatojn. La fonaj kaŭzoj estas klaraj: la lasta Informo pri la Homa Disvolvo de Unuiĝintaj Nacioj montras, ke en la subsahara Afriko vivas 100 milionoj pli da homoj en ekstrema malriĉeco ol en 1990. Pli proksima kaŭzo estas la kreskanta premo de Maroko kontraŭ tiuj homoj, kiuj amasiĝas en aĉaj kampadejoj proksimaj al Sebto kaj Melilo, sen manĝaĵoj, akvo kaj kuraciloj, kiel denuncadas de la komenco de la jaro la neregistara organizaĵo SOS Rasismo kaj kiel publikiĝis en la Informo 2005 de la Hispana Komisiono por Helpo al la Rifuĝintoj. Nelaste, ankaŭ la plialtigo de la duobla drat-barilo, kiu ĉirkaŭas la du urbojn de 3 al 6 metroj, komencita antaŭ kelkaj monatoj, certe ludas rolon.

Al la sturmoj, kaj sinsekvo de 10 mortigoj (14 laŭ neoficialaj fontoj) kaj centoj da vunditoj, la hispana registaro premis la marokajn aŭtoritatojn. Eŭrop-Uniaj helpoj kun valoro de 40 milionoj da eŭroj promesitaj antaŭ du jaroj estis tuj malblokitaj, kaj por la unua fojo Maroko aplikis la hispan-marokan traktaton de 1992, per kiu Maroko devigas sin reakcepti la elmigrintojn el triaj landoj enirintaj Hispanion tra ĝia teritorio. Unua grupo de 70 homoj flugis al Tanĝero jam en la 6a de oktobro.

## Elmigrintoj kontraŭ enmigrantoj

Tamen Maroko komencis apliki novan politikon al la enmigrintoj. Anstataŭ veturigi ilin ĝis la norda landlimo kun




*Maroko antaŭvidas multobliĝon de la dramaj provoj transiri la Ĝibraltaran Markolon aŭ eĉ la oceanon ĝis la Kanariaj Insuloj per boataĉoj.*

Alĝerio, ĝi forlasis centojn da homoj en la dezerto. Kunlaborantoj de Kuracistoj Sen Limoj trovis pli ol 500 homojn 30 km for de la urbo Ajn aŝ-Ŝuatir, en dezerta limregiono kun Alĝerio la 7an de oktobro. La neregistara organizaĵo klarigis, ke inter tiuj homoj troviĝis infanoj, gravedulinoj kaj tre gravaj vunditoj, kaj ili havis nek manĝojn nek akvon. Laŭ SOS Rasismo kaj *Prodein* – konfirmintaj la novaĵon – mortis 24 ▶



*La drataro de Melilo*



*Maroko forlasis centojn da homoj en la dezerto*

▶ homoj el tiu grupo. Aliaj denuncoj venis pri forlaso de aliaj grupoj en neniejo apud Maŭritanio, kaj ankaŭ Fronto Polisario asertis, ke Maroko forpelis 80 elmigremulojn trans la muregojn, kiuj meze de la dezerto rolas kiel fakta limo inter ĉi tiu gerila teritorio kaj la marokaj okupaciantoj de Okcidenta Saharo.

Tiuj kontraŭhomaj agadoj de la maroka registaro metis la hispanan registaron en tre embarasan situacion, kaj laŭtigis la voĉojn de la kolektivoj kontraŭaj al la enmigro-politikoj de la lastaj hispanaj registaroj. La prezidantino de la Patrinoj de la Majo-Placo, Hebe Pastor [ebe pastór] de Bonafini, sendis malfermitan leteron al la prezidanto de la hispana ekzekutivo, José Luis Rodríguez Zapatero [ĥosé lŭis rodriges sapatero], pri la agado de lia registaro pri la amasaj alvenoj de afrikanoj al Sebto kaj Melilo. En ĝi ŝi memorigis, kiel miloj da hispanoj estis akceptitaj de Argentino, kiam ili fuĝis de la malsato post la hispana milito. Ankaŭ por multaj hispanoj, mem spertintaj elmigradon al aliaj landoj, la nunaj okazaĵoj kreas akrajn konsciencriproĉojn. Entute, en la lastaj dek jaroj mortis 1400 homoj klopodantaj eniri Hispanion, laŭ registaraj fontoj. Tamen, laŭ informoj de Kuracistoj Sen Limoj, la nombro altiĝas ĝis 6300.

## Afriko neglektita

Malsato minacas kvin milionojn da homoj en Sahelo, laŭ kalkuloj de la Nutraĵa kaj Agrokultura Organizaĵo de UN. Ĝin kaŭzas fatala kombino de pluv-manko kaj akridoj. Kiam antaŭ unu jaro plago de migrantaj akridoj neniigis 4 milionojn da hektaroj en Maŭritanio, Senegalo, Malio, Niĝero kaj Ĉado, kelkaj jam prognozis intensan migroondon en 2005: „Oni ne volis doni la necesan helpon ĝustatempe, do ili devos pagi la fakturon per elŝipiĝo," tiam deklaris maroka funkciulo, antaŭvidanta multobliĝon de la dramaj provoj transiri la Ĝibraltaran Markolon aŭ eĉ la oceanon ĝis la Kanariaj Insuloj per boataĉoj.

Nur el Malio, la akridoj, kapablaj forgluti en unu tago kvanton egalan al sia propra pezo, neniigis unu milionon da hektaroj. De la 900 subsaharanoj loĝigitaj meze de oktobro en la Centro de Portempa Restado por Enmigrintoj de Melilo, 35 % estis maliaj. Sed la mizero estas ĝenerala en aliaj landoj: el la 674 milionoj da subsaharanoj nombritaj en 2003, 46 % travivas per malpli ol po unu dolaro tage, laŭ la Monda Banko.

## Ekonomia kresko

Ĝuste la hispana ministro pri Internaj Aferoj, José Antonio [ĥosé antonjo] Alonso agnoskis, ke „misfunkcias la internacia politiko pri helpo al Afriko." Tamen li ne parolis pri la propra hispana politiko, kiu tre foras de la fama celo de la 0,7 % de la malneta enlanda produkto (MEP): malgraŭ la granda ekonomia kresko de la 80aj kaj 90aj jaroj, la helpo por disvolvado falis je 20 %, kaj tre aparte dum la jaroj de la dekstra registaro de la Popola Partio, kiu, laŭ *Intermón Oxfam*, reduktis la investojn ĝis 0,23 % de la MEP. Krome, la hispanaj investoj por disvolvado ĉiam prioritatigis Sud-Amerikon, anstataŭ la najbarajn sudajn landojn. Plie, laŭ raporto de *OneWorld*, Hispanio estas la lando de la Organizaĵo por Ekonomiaj Kunlaboro kaj Evoluigo kun la plej granda procento de helpo ligita al propraj komercaj interesoj: la t.n. kreditoj FAD, kiuj tiom ete helpas la disvolviĝantajn landojn kaj ja impulsas la komercan ekspansion de la hispanaj entreprenoj.

Kiu semis venton, rikoltis fulmotondron.

Hektor Alos i Font

# Krimo forgesita



BARTOLUS

**En aprilo 2005 okazis la 90a datreveno de la genocido de la armena popolo. La evento estas mondskale agnoskita, ĉu per sciencaj kongresoj, ĉu per eldonado de libroj kaj vidbendoj. Ĉi tie estas prezentataj fono kaj faktoj pri la unua genocido de la 20a jarcento.**



ARMENIAN NATIONAL INSTITUTE

*1915-1916, kadavro de juna armena viro senveste mortigita. Vundoj videblas en la kapo kaj sub la brusto.*

Komenciĝis la ekstermado en la 19a jarcento. Inter 1894 kaj 1896 pereis 300 000 armenoj kaj pliaj 300 000 fuĝis al aziaj, eŭropaj kaj afrikaj landoj. Sed la tiama masakro apenaŭ kompareblis kun la genocido okazinta en 1915.

### Sekreta instrukcio

En 1911, en la nun greka urbo Tesaloniko, kaŝe kunvenis Junaj Turkoj, kiuj decidis turkigi islamanojn en la turka imperio kaj ekstermi kristanojn. Ili atendis oportunan momenton. Kiam komenciĝis la unua mondomilito, en aŭgusto 1914, la turka registaro komprenis, ke dum milita ĥaoso ne rimarkeblos genocido. En aprilo 1915 estas sendita sekreta instrukcio, laŭ kiu la armena loĝantaro estu forpelita al arabaj dezertoj kaj tiel eliminita.

La programo efektiviĝis tripaŝe. Komence la turkoj rekrutigis ĉiujn armenajn virojn, kapablajn uzi armilojn, kaj ilin sekrete buĉis. Duapaŝe arestiĝis partiaj, intelektaj kaj religiaj armenoj: ekzemple iun nokton en aprilo 1915 en Istanbulo la polico arestis 800 intelektulojn. Triapaŝe oni sendis ekzilejen virinojn, infanojn kaj maljunulojn.

### Masakritaj

El 2,5 milionoj da armenoj estas masakritaj aŭ mortis pro malsato kaj malsano 1,5 milionoj. Aliaj fuĝis eksterlanden kaj 200 000 perforte turkiĝis. Samtempe okazis kultura genocido: estis detruitaj 66 urboj, 2500 vilaĝoj kaj 1500 lernejoj. Krome la turka registaro alproprigis al si posedaĵojn kaj bankkontojn de armenoj.

La krimo restis senpuna. Nur post la dua mondomilito oni ekkonsideris genocidon punebla. Nun 15 registaroj de la mondo agnoskas la genocidon de armenoj en Turkio. En 1967, en Parizo, dum dua internacia kongreso pri krimoj, oni akceptis la nocion „armenocido”. Tamen la turka registaro ankoraŭ ne agnoskis la genocidon, kiel analoge la germana agnoskas la holokaŭston.

Susanna Gevorgjan

*Multaj armenaj infanoj iĝis orfaj dum la genocido*

ARMENIAN NATIONAL INSTITUTE



INTERNACIAJ RILATOJ

# Mara koŝmaro






*Koper, la sola komerca haveno de Slovenio*

Jugoslavio interkonsentis pri landlimoj kun Italio, per kio precize estis difinita ankaŭ la mara limo en Adriatiko. Oni difinis punkton M5, kie intertuŝiĝis linio inter tera limpunkto kaj la internacia maro. Kiam disfalis Jugoslavio, okazis principa interkonsento inter Slovenio kaj Kroatio, ke la limoj inter ili restu tiuj, kiuj estis ene de Jugoslavio, sed neniu tuŝis la demandon pri la mara limo.

Laŭ la internacia mar-kodo la slovena marlimo kun Italio estas la iama jugoslav-itala marlimo. Sed kun Kroatio la marlinio devus iri meze de golfo duone kroata kaj duone slovena. Tiamaniere la slovena maro estus triangulеto, kiu ne atingus la internacian maron, fermita unuflanke per la limo kun Italio kaj aliflanke per la limo kun Kroatio.

Ĉar Slovenio devas kalkuli kun eventuala disfalo de Eŭropa Unio kaj kun la eblo, ke ĝi denove estus tute suverena ŝtato sen eliro al la internacia maro, ĝi volas interkonsenti kun Kroatio pri slovena koridoro, per kiu eblus navigi al la slovena haveno Koper, sen peti permeson de Kroatio aŭ Italio (kiel Francio aprobis koridoron al Monako).

## Ekologiaj problemoj

En 2003 la kroata parlamento proklamis ekologiŝirman maran zonon, kiu plivastigas la markompetentojn de la kroata polico je plia trideko da kilometroj en la internacia maro. Tiu ĉi leĝo ne deklaris, ke Kroatio alproprigis plian marteritorion; simple ke ĝi decidis ekzorgi pri ekologiaj marproblemoj sur pli vasta areo. Praktike la decido signifas, ke nun la kroata ekologia zono enhavas ankaŭ la tutan slovenan marteritorion.

La proklamo kaŭzis grandan ekscitоn en Slovenio. Komence de oktobro 2005 la slovena parlamento siavice akceptis leĝon pri ekologia ŝirmzono, kio plivastigis la kompetentojn ankaŭ de ĝia polico. Tio signifas, ke slovenoj ekologie respondecus pri iom da kroata marteritorio.

Reage ekscitiĝis kroatoj, kies parlamento deklaris la slovenan leĝon senvalora. Samtage la kroata ministrino pri eksterlandaj aferoj Kolinda Grabar-Kitarović sendis leteron al sia slovena samrangulo, Dimitrije Rupel, proponante, ke internacia kaj neŭtrala tribunalo decidu la aferon.

## Parlamento

Sed slovenoj ne ŝatas tiun solvon, kiu povus esti malavantaĝa por ili. Ili insistas pri jam atingita interkonsento pri markoridoro el la jaro 2002 inter la tiamaj registaroj. Tiun interkonsenton akceptis kaj ratifis la slovena parlamento, sed la kroata ne ratifis ĝin, kaj tial ĝi neniam ekvalidis.

Aliflanke la slovenoj volas „komerci" pri la afero. Ili pretus doni du malgrandajn surterajn teritoriojn al kroatoj kontraŭ markoridoro. Kroataj politikistoj scias, pri kio temas, sed neniu reganta partio post 2002 kuraĝis proponi tiel „fordoni" la propran teritorion, timante la politikajn riskojn.

Tamen la kroatoj timas, ke, kiam Kroatio kiel definitiva kandidato por EU-membriĝo komencos detale intertrakti kun la unio, Slovenio – jam membro de la 25-ŝtata unio – eble negative influos la diskutojn. Tiel restas situacio, kiu estigas malamikecon inter du najbaraj ŝtatoj kaj malutilas al ambaŭ.

Zlatko Tišljar

ENERGIO

# Litovio volas resti nukle-energia ŝtato



**Aniĝante al Eŭropa Unio (EU), Litovio akceptis la devon fermi sian nuklean centralon en Ignalina, kie funkciis du Ĉernobil-tipaj reaktoroj. La unua reaktoro, taksita malsekura, estis fermita fine de la jaro 2004. La dua estas fermota fine de 2009. Tamen Litovio ne volas tiel facile rezigni pri sia nuklea praktiko.**

58 el 141 litovaj parlamentanoj, reprezentantaj preskaŭ ĉiujn parlamentajn frakciojn, akceptis la ideon pri plilongigo de la funkciado de la dua reaktoro kaj pri evoluo de nuklea energio. Politikistoj opinias, ke nun estas tre favora situacio por tiaj debatoj inter Litovio kaj EU: la prezo de petrolo kaj sekve de fueloj altiĝas. Iliaopinie, lastatempe EU mem iĝis pli favora al nuklea energio: malnovaj centraloj moderniĝas aŭ estos konstruataj novaj. Krome internaciaj spertuloj konfirmis, ke la centralo de Ignalina estas sufiĉe sekura.

En sia rezolucio la parlamento proponis al la registaro akcepti „konkretajn decidojn" pri fermo de nuklea centralo kaj pri konstruo de nova centralo, kiu estu preta en 2015-2017. Parlamentanoj ankaŭ instigis la registaron prilabori programon pri la evoluigo de nuklea energio en Litovio, en kiu estu fiksitaj principoj de la konstruado de nova nuklea centralo, ĝiaj financaj kondiĉoj kaj postuloj por eventualaj investantoj kaj produktantoj.

Antaŭe Algirdas Brazauskas, la ĉefministro de Litovio, ideojn pri nova reaktoro kaj estonteco de la lando kiel nuklea ŝtato nomis vanaj. Tamen nun li ordonis prepari juran, ekonomian kaj financan fundamentojn por allogi investantojn. Pri neceso de nova nuklea centralo atentigis ankaŭ la ĉefministroj de Latvio kaj Estonio.

Tamen spertuloj avertis, ke konstruado de nova nuklea reaktoro estos multekosta afero. Se Litovio sukcesos en tio, ĝi devos zorgi ankaŭ pri sekura deponejo de nukleaj restaĵoj. Tio kostus pli, ol la konstruado de nova nuklea centralo. Oni kalkulis, ke aranĝo de deponejo de uzita nuklea brulaĵo, la plej danĝera radioaktiva restaĵo, kostus ĉirkaŭ 2,6 miliardojn da eŭroj kaj la konstruado de la centralo inter 2,03 kaj 2,32 miliardojn.

Por la zorgo pri la unua reaktoro, kies malmuntado estas antaŭvidita ĝis la jaro 2030, kaj la kun tio ligitaj laboroj jare estos bezonataj ĉirkaŭ 14,48 milionoj da eŭroj. En la fonduso por la ĉesigo de funkciado de la centralo nun estas ĉirkaŭ 340 milionoj da eŭroj.

En 2005 la nuklea centralo de Ignalina planas vendi 8,5 ĝis 9 miliardojn da kilovathoroj da elektroenergio, t.e. je 35 % malpli, ol dum la antaŭa jaro.

LAST



*Funkciado de la nuklea centralo de Ignalina estas antaŭvidita ĝis la fino de la jaro 2009.*

ENERGIO

# Gasodukta projekto implicas politikajn problemojn



*En la fundo de Balta Maro kuŝas restaĵoj de kemiaj armiloj.*

**La 8an de septembro 2005 naskiĝis nova projekto, pri kiu interkonsentis la ŝtatestroj de Rusio kaj Germanio: balta gasodukto. La kontrakton subskribis respondeculoj de la rusa monopola gaskompanio Gazprom kaj de la germanaj energetika entrepreno E.ON kaj entrepreno Wintershall, apartenanta al la kemi-industria kompanio BASF. La gasodukto, kies konstruo kostos ĉirkaŭ 5,7 miliardojn da usonaj dolaroj kaj kiu ekfunkciu en 2010, al okcidenta Eŭropo kapablos liveri ĉirkaŭ 55 miliardojn da kubaj metroj da natura gaso.**

Laŭ la projekto gaso el Siberio al Germanio estos liverata per 1189 km longa gasodukto, en la profundo de Balta Maro, inter la rusa urbo Viborg kaj la germana Greifswald. Tiel ĝi ĉirkaŭiros la baltajn ŝtatojn kaj Pollandon.

La rusan-germanan interkonsenton la litova ĉefministro Algirdas Brazauskas komence traktis trankvile. Laŭ li, la nuna gasodukta infrastrukturo en Litovio respondos postulojn de la lando ankaŭ post dek jaroj. Dum la jaroj 1985-1990 la lando jare konsumadis pli ol 7 miliardojn da kubaj metroj kaj nun nur 2,9 miliardojn.

Tamen poste kun bedaŭro la ĉefministro konstatis, ke pri nova rusa-germana projekto Litovion neniu informis, nek demandis. Li menciis pri antaŭaj planoj de *Gazprom* konstrui gasodukton tra Latvio, Litovio kaj la kaliningrada regiono. Ĝi donus eblecon liveri gason ankaŭ inversdirekte, ekzemple, el la Norda Maro. Tiel Litovio kaj Latvio estus protektitaj kontraŭ politikaj aŭ teknikaj hazardoj.

Diskutojn pri ŝanĝo de la jam proklamitaj planoj Brazauskas nomis vanaj. Li promesis en kunveno de la



ĉefministroj de la nordaj kaj baltaj landoj iniciati rezolucion, ke dum la konstruo de gasodukto estu observatataj konvencioj pri protekto de Balta Maro. Li atentigis, ke en la fundo de la maro, je 120 km de la litova bordo, estas restaĵoj de kemiaj armiloj. Tie post la jaro 1945 rusoj subakvigis minimume 30 000 kontenerojn kun toksa gaso.

Konservativulo Vytautas Landsbergis, eŭropa parlamentano kaj eksa litova parlamentestro, nomis novan gasodukton, kiu kunligos Rusion kaj Germanion, intenco redesegni la mapon de Eŭropo. „Tiu ĉi nova germana-rusa alianco, hodiaŭ nomata per la internacia termino ‘energia alianco’, estas planita por ŝanĝi la politikan mapon de Eŭropo. Estas domaĝe, ke Eŭropo pretas financi tion.” Li substrekis, ke ĉiokaze en la plej malavantaĝa situacio restos Pollando kaj baltaj ŝtatoj, baritaj eĉ disde provizora skandinavia alternativo kaj fordonitaj al rusa bonvolo, ĉar manipulado per monopolaj prezoj estos oportuna rimedo por ankaŭ manipuli politikon de najbaraj landoj.

La nuna litova parlamentestro Arturas Paulauskas aldonis, ke Germanio, traktante la gasoduktan aferon, neglektis petojn de aliaj landoj, membroj de Eŭropa Unio, inter ili ankaŭ Litovio. Germanaj kolegoj asertis, ke gasodukto estas afero de privataj kompanioj, tamen Paulauskas opinias, ke gasodukto estas sufiĉe grava energetika projekto, aprobota ankaŭ en politika nivelo.




Dum la rusa prezidanto Vladimir Putin kaj la tiama germana kanceliero Gerhard Schröder varme ĉirkaŭbrakis unu la alian pro la sukcesa decido, la prezidanto de Pollando Aleksander Kwaśniewski forte kritikis la pozicion de najbara Germanio. Liaopinie ne estas bone, ke grava ŝtato efektivigas tian politikon sen konsideri la opinion de la najbaroj kaj de EU, ĉar fakte ĝi estas projekto de Rusio kaj Germanio, kiu ne apartenas al ĝenerala eŭropa koncepto.

La rusa prezidanto Putin konfirmis, ke la gasodukta plano kaŝas neniujn politikajn motivojn, kaj li invitis landojn de Eŭropo partopreni en la projekto. La rusa gazetaro tiurilate mencias, ke konstruo de la gasodukto donas al Rusio la eblon forte plibonigi siajn ekonomiajn kaj politikajn poziciojn en Eŭropo.

LAST




NIĜERIO

# Duobla tragedio

Skuis Niĝerion du tragedioj ene de 24 horoj en oktobro. Pereis 117 pasaĝeroj, kiam kraŝis aviadilo survoje el la komerca ĉefurbo Lagoso al la politika ĉefurbo Abuja, kaj mortis la t.n. unua virino de Niĝerio, la edzino de la prezidanto Olusegun Obasanjo, post operacio en Hispanio. Anoncis la registaro tritagan nacian lamentadon por la viktimoj de la kraŝo kaj por la mortinta unua virino.

Stella Olusegun, 59-jaraĝa, estis la plej influa virino en la lando. Laŭ la niĝeria konstitucio, la unua virino ne havas oficialan rolon, sed multaj trovis pro ŝi aliron al la prezidanto. Krome ŝi okupiĝis pri infanoj en sia devenŝtato Edo kaj fondis asocion, kiu aktuale flegas 80 handikapitajn infanojn kaj ilin nutras kaj edukas.

En la aviadilo de la kompanio *Bellview* pereis pluraj gravuloj, inkluzive de la ĉefoj de la niĝeriaj poŝto kaj fervojo, kaj la estroj de banko kaj de kvinstela hotelo.

Princo Henriko Oguinye/pg




ĈINIO

# Kun siaspeca spaco

EPĈ



En oktobro la ĉina kunhoma kosmoŝipo *Shenzhou 6* altiris multe da atento en kaj ekster Ĉinio. La sukcesa lanĉo kaj reveno de du kosmonaŭtoj fariĝis ekscita evento por la ĉina nacio kaj indikis, ke Ĉinio plu progresis en spac-esplorado.

La ĉina spac-projekto konsistas el tri fazoj. La unua estis atingita en 2003, kiam la unua ĉina kosmonaŭto, Yang Liwei, sukcese observis la teron kaj faris sciencan eksperimenton. La dua fazo estas plenumata per la sukcesa lanĉo de la kunhoma eksperimentejo *Shenzhou 6*. La tria fazo celas starigi konstantan kosmo-eksperimentejon kaj kosmo-projektan sistemon.

Chen Lina

# Trançilo ideologia



Edi Rama, la urbestro de Tirano, kiu antaŭ nelonge ricevis la honoran titolon „Monda urbestro”, provis vane mildigi italajn ĵurnalistojn.

Antaŭ nelonge la gazetaro en norda Italio denove kampanjis kontraŭ fremduloj, aparte albanoj. Tion estigis mortigo de italo per trançilo fare de albana enmigrinto en la urbo Varese.

Estis intervjuitaj en la ŝtata televida kanalo RAI 3 la ĉefredaktoro de la ĵurnalo *La Padania*, organo de la itala ekstremdekstra partio *Lega Nord*, kaj la urbestro de Tirano Edi Rama. La ĵurnalisto ripetis, ke enmigrintoj estas krimuloj, danĝeruloj kaj forpelenduloj. Rama, kondolencante la parencojn de la viktimo, atentigis, ke pli danĝera ol la trançilo de la albano estas la ideologia trançilo ekzemple de ĵurnalistoj, kiuj kondamnas tutan etnon, ĉar kelkaj ties anoj krimas.

### Digne kaj sukcese

En Italio estas 250 000 albanaj enmigrintoj, kiuj faras laborojn malfacilajn kaj neŝatatajn de enlandanoj, kaj kiuj perlaboras malpli ol italoj kontraŭ la sama laboro, aparte kiam ili laboras „nigre”, tio estas kiam ili estas ankoraŭ ne registritaj. Sed ĝenerale la albanoj kondutas digne kaj sukcese, ekzemple studentoj, kiuj atingas bonajn rezultojn. Kaj la televido en Italio raportis pri albano, kiu intervenis, kiam vendisto estis atakata: nur pro la albano eblis aresti la atakinton.

Inverse Rama menciis la italan enmigrinton en Usono, kiu murdis antaŭ nelonge sian usonan fianĉinon. La tieaj instancoj, diris Rama, ne reagis kiel la italoj kontraŭ la albanoj kaj ne kondamnis la tutan etnon. Simple, en ĉiu etno estas krimuloj, sed la krimo de unu ne fariĝu preteksto por kondamni la konduton de ĉiuj.

Bardhyl SELIMI





*La itala ekstremdekstra partio* Lega Nord *propagandas kontraŭ la enmigrintoj*



NIĜERIO

# Forpasi, elspezi



Lastatempe estis raportite, ke niĝerianoj vivas meze 41 jarojn. La statistiko ŝokas, ĉar Niĝerio posedas nafton kaj pro tio multe enspezas. Tamen ĝi restas inter la malriĉaj landoj de la mondo. La riĉaĵoj eniras la poŝojn de koruptaj politikistoj kaj eksaj soldatoj, kiuj misuzas la enspezojn.

Rezulte, ordinaraj niĝerianoj fariĝis kadavro-manĝantoj, kiuj ĉiutage batalas kontraŭ hundoj kaj aliaj bestoj por manĝi rubaĵojn, dum politikistoj kaŝas siajn enspezojn en sekretajn eksterlandajn kontojn.

Pro tio niĝerianoj ne iras al hospitalo pro la alta kosto kaj, se ili tamen tie troviĝas, familianoj kaj parencoj vendas bienojn kaj posedaĵojn por pagi la kostojn. Multaj homoj do preferas morti hejme, dum riĉuloj ĝuas la lukson iri hospitalen. Sed ironie estas, ke, se iu mortas hejme, tiu ne evitas elspezojn.

### Dancistoj

Funebraj kostoj varias, sed ĝenerale altas. Funebro daŭras tagojn aŭ semajnojn, depende de la aĝo kaj rango de la mortinto. Se tiu havis tradiciajn honorojn aŭ titolojn, la familianoj dungas dancistojn kaj amase kuiras por funebrantoj. Ofte oni drinkas ĝis ebriiĝo, kaj poste la familianoj devas kalkuli la ŝuldojn.

Ankaŭ ĉerko multon kostas, kaj fojfoje aldonendas elspezoj por transporti la kadavron al la hejmloko de familianoj. Krome, aparte en la ekonomia ĉefurbo Lagoso, kie mankas spaco en tombejoj, nepras pagi ŝmirmonon al la aŭtoritatoj por ricevi enterigejon (kiun oni reuzas post kvin jaroj).

En la vilaĝoj oni kutime enterigas mortintojn ĉe la familia domo. Sed ĉiaokaze malsani kaj morti – same kiel vivi – multe kostas en Niĝerio.

Princo Henriko Oguinye/pg

---

LITOVIO

# Profitoj, pasportoj kaj prostituado

Litovaj parlamentanoj dum oficvojaĝo en Britio konsterniĝis pro la londona seks-komerco, en kiu partoprenas junaj litovinoj. Laŭ britaj aŭtoritatoj pli ol 1000 litovinoj „vendiĝas” ĉiujare kaj estas devigataj labori kiel prostituitinoj.

Britaj ŝakristoj pagas ĝis 7000 eŭrojn por litovino, kontraste al 500 en aliaj landoj de Eŭropa Unio. Spertuloj kalkulas, ke prostituado profitigas la litovan ekonomion je 15 milionoj da eŭroj kaj hom-komercado je pli ol 60 milionoj.

Ekde majo 2004 estas liberigitaj en Britio pli ol 80 viktimoj de hom-komercado. Ĉiusemajne la brita polico arestas ĉirkaŭ 70 virinojn kun litovaj pasportoj. Tamen multaj ne estas litovinoj sed viktimoj de hom-komercado el Moldavio, Ukrainio, Belorusio kaj aliaj landoj de orienta Eŭropo.

### Romantika semajnfino

Parlamentanoj opinias, ke unu el la plej efikaj rimedoj por kontraŭstari hom-komercadon estas edukado. „Knabinoj devus esti prudentaj, se oni proponas romantikan semajnfinon en Londono, ĉar tiel facilas enplektiĝi en la reton de hom-ŝakristoj”, diris parlamentano.

Krome parlamentanoj postulas pli severajn punojn ol nun ekzistas. Ili citis ekzemplon el Svedio, kie klientoj de geamoristoj riskas monpunon ĝis 1100 eŭroj aŭ eĉ malliberigon. En Litovio leĝoj antaŭvidas punon ĝis nur 150 eŭroj la unuan fojon kaj ĝis 300 la duan.

LAST



# Vendejen!

Evoluas nuntempe t.n. 100-enaj vendejoj en Japanio. Valoras 100 enoj proksimume unu usonan dolaron; afranko de letero al aziaj landoj kostas 90 enojn, al Usono aŭ Eŭropo 110 enojn. Do por japanoj 100 enoj estas simbolo de „malmulta kosto”.

Kiam aperis en la lasta duono de la 1980aj jaroj la unuaj 100-enaj vendejoj, kie ĉio aĉeteblas kontraŭ 100 enoj, multaj homoj pensis, ke la varoj estas malmultekostaj kaj do malbonaj. Tamen tiu ĉi impreso pli kaj pli malaperis, tiel ke nun regas tre favora opinio pri la vendejoj.

La plej granda kompanio pri 100-enaj vendejoj estas Daisō, kiu posedas 2400 vendejojn enlande kaj 350 eksterlande. Ĝia vendosumo atingis 50 miliardojn da enoj en 1997, 200 miliardojn en 2000 kaj 320 miliardojn en 2005. Ĉe Daisō oni vendas varojn por ĉiutaga vivo – preskaŭ ĉion krom freŝajn manĝaĵojn kiel legomojn, fiŝojn aŭ viandojn.

### Konkurenco

Sed, konkurence kontraŭ Daisō, en 2000 alia kompanio malfermis siajn t.n. vendejojn 99, kie aĉeteblas kontraŭ 100 enoj ankaŭ freŝaj manĝaĵoj. La kompanio nun havas 580 vendejojn en Tokio kaj ĉirkaŭe kaj, kompare kun marto 2003, ĝia vendosumo kvarobliĝis. Kontraŭ la novstilaj 100-enaj vendejoj, la t.n. oportunaj vendejoj komencis oferti freŝajn manĝaĵojn kontraŭ 100 enoj. Planataj ekzemple de la firmao Lawson estas 1000 tiaj vendejoj.

Malantaŭ tiuj interbataloj kuŝas kelkaj kialoj, ekz. sociaj kaj familiaj ŝanĝiĝoj (la apero de maljunaj paroj, kies gefiloj sendependiĝis; junaj paroj sen gefiloj; senfamiliaj unuopuloj: por tiuj tre utilas la ebleco aĉeti malgrandkvante). Ankaŭ kreskanta malriĉeco en Japanio kontribuas al la florado de 100-enaj kaj similaj vendejoj: kiam Japanio ekonomie „bolis”, oni hontis eniri malaltprezajn butikojn.

Analizisto diris, ke jam finiĝis la epoko, kiam apartaj specoj de vendejoj, ekz. magazenegoj, superbazaroj, oportunaj vendejoj kaj 100-enaj vendejoj, dependas de apartaj klientaj tavoloj. Venis la epoko, kiam ĉiuj vendejoj interbatalas por kapti pli da klientoj el ajnaj sociaj tavoloj.

Hori Jasuo/pg

## Tro vivi foje ne bonas

Nuntempe en Japanio virinoj meznombre vivas 85,59 jarojn kaj viroj 78,64: tio estas respektive 0,26 kaj 0,28 jarojn pli longe ol en 2003. Japanaj virinoj pli longe vivas ol virinoj en iu ajn alia lando, kaj nur islandaj viroj pli longe vivas ol japanaj. En 2004 la japana vivlongeco estas 10 jarojn pli ol en 1965.

Tamen ju pli longe homoj vivas, des pli notindas aparte demencaj maljunuloj. En Japanio vivas ĝis 1,69 milionoj da demenculoj, sed, laŭ prognozoj, en 2015 vivos 2,5 milionoj. Tre varias la simptomoj: kelkaj maljunuloj nur milde suferas sed aliaj estas perfortemaj, vagemaj aŭ forgesemaj. Precipe tiuj lastaj ĝenas kaj lacigas familianojn.

En multaj komunumoj oni okazigas kursojn por eviti demencon. Rekomenditaj estas interalie rememoro-terapio (oni rememoru la junajn tagojn, por ke la cerbo juniĝu), lernado, ĝardenado, arto kaj muziko. Ankaŭ sano-kursoj gravas.

D-ro Uragami Kacuja de la universitato Tottori donas enketilon al siaj kursanoj por trovi demencon. Eĉ unusola jesa respondo povas indiki demencon:

- Mi ne scias, en kiuj tagoj de semajno kaj monato mi estas.
- Mi ofte forgesas nomojn de familianoj.
- Mi ofte forgesas gravan promeson.
- Mi ne povas kuiri diversajn pladojn.
- Mi ne volas ekstereniri aŭ butikumi.


Tro vivi foje ne bonas. Vidante siajn gepatrojn, pli kaj pli da japanoj nun pripensas sian propran estontecon kun maltrankvilo.

Hori Jasuo/pg



ASTRONOMIO

# Unua fotografaĵo de ekstersunsistema planedo




EŬROPA SUDA OBSERVATORIO, ESO

*La malforta ruĝeca makulo de lumo estas la unua bildo de ekzoplanedo.*

**„Niaj novaj bildoj montras konvinke, ke tiu vere estas planedo, la unua planedo ekster nia sunsistemo, kiu estis bildigita", asertas Gael Chauvin, skipestro kaj astronomo de la Eŭropa Suda Observatorio (ESO).**

*2M1207b* estas la nomo de la unua rekte observita planedo ekster nia sunsistemo. Novaj bildoj, faritaj dum februaro kaj marto de ĉi tiu jaro, finfine konkludis disputon inter astronomoj, disputo kiu daŭris proksimume unu jaron. Benjamin Zuckermann, teamano kaj profesoro de fiziko kaj astronomio, diris, ke li estas „pli ol 99 %" certa pri la eltrovo. Bildo farita dum aprilo 2004, montris malfortan, ruĝan makulon apud *bruna nano* (vd. terminaron fine) lokita proksimume 200 lumjarojn for. La objekto brilas proksimume 100-oble pli malforte ol la apuda bruna nano. Sed tiutempe la preciza naturo de la objekto estis malcerta.

*VLT de Eŭropa Suda Observatorio en Cerro Paranal.*




Novaj analizoj, uzante spektroskopiajn metodojn, nun certigis, ke *2M1207b* fakte estas planedo. Forta signo de akvo estas videbla en la spektro, grava indiko, ke la objekto estas malvarma. La relative malalta temperaturo, de proksimume 976°C, indikas, ke la objekto ne povas esti stelo. Tamen, kelkaj astronomoj menciis, ke la naskiĝo de la objekto estis nekutima por planedoj. Laŭ iliaj opinioj, *2M1207b* formiĝis, samkiel la steloj, per gravita kolapso de kosma nebulo.

La planedo troviĝas en la konstelacio Hidro kaj pezas kvinoble pli ol la planedo Jupitero. Ĝi rotacias ĉirkaŭ la bruna nano je 55-obla sun-monda distanco. La novaj observadoj ankaŭ montris, ke la planedo kaj la bruna nano moviĝis kune, tiel konfirmante, ke ili estas ligitaj per gravito. La taksita periodo de rivoluo de la planedo estas proksimume 2500 jaroj. Pro tiu kaŭzo ne jam eblis observi la movadon de la planedo mem. Uzante la nunan teknikan skipon, kelkaj jardekoj de observadoj estus necesaj.


### Aplikitaj metodoj

La unua ekstersunsistema planedo estis eltrovita jam antaŭ dek jaroj, en




GQ Lupi: *La stato de la objekto (b) estas ankoraŭ malcerta.*

EŬROPA SUDA OBSERVATORIO, ESO




*AB Pictoris: Ĉu la objekto (sube, maldekstre) estas tro peza por esti planedo? La stelo (dekstre) estis artifike eklipsita por redukti ĝian helecon.*

1995. Ekde tiam la listo de tiel nomataj *ekzoplanedoj* kreskis ĝis pli ol 150 kandidatoj. Ĝis nun la ekzisto de planedoj ekster nia sunsistemo estis pruvata per malrektaj metodoj. La planeda gravito translokas tien reen la centran stelon iomete, tiel kaŭzante koloran fluktuadon de la stela lumo. La mezurado de tiu fluktuado ebligas dedukton pri la atributo de la planedo. Alia aplikata metodo estas la mezurado de la malheliĝo de la stelo, kiam la planedo pasas antaŭ ĝi. Kontraŭe, la rekta observado de ekzoplanedoj estas ege malfacila afero: ofte la brilo de la centra stelo kaŝas la malfortan planedan lumon. Tamen, por scii pli pri la kemia konsisto de la planedo, tiu rekta observado estas nepre necesa.

La teamo uzis unu el la kvar „tre larĝajn teleskopojn” (nomitaj „VLT”, *very large telescope*) de ESO sur monto Cerro Paranal en Ĉilio. La diametre 8,2-metra teleskopa ĉefspegulo estas ekipita kun adaptebla optika sistemo. Tiu sistemo kompensas la perturban efikon de la tera atmosfero, pliboniĝante la kvaliton de la observado tiel, ke eĉ la malforta ekzoplaneda lumo estis videbla.

### Ĉu planedo aŭ bruna nano?

Oni povas konsideri brunajn nanojn iel „sensukcesaj” steloj, ĉar ili ne posedas sufiĉe da maso por ekigi plenan nuklean fuzion. Tial ili okupas apartan rangon inter planedoj kaj steloj: tro pezaj por esti planedo, tro malpezaj por esti stelo. La limo inter gigantaj planedoj kaj brunaj nanoj estas ankoraŭ pridisputata. Por klasifiki objekton planeda, ĝia maso devas esti sufiĉe malgranda. Laŭ la difino de la Internacia Astronomia Unio, brunaj nanoj devas havi almenaŭ 13,6 MJup (jupiterajn masojn), kiu estas la minimuma maso por fuzii deŭterion.

Laŭ tiu difino, objekto *2M1207b* (kvin MJup) estas planedo. Dum siaj serĉadoj de ekzoplanedoj, la sama teamo eltrovis ankaŭ objekton ĉe la stelo *AB Pictoris*. Ĉar la maso de tiu objekto estis determinita inter 13 kaj 14 MJup, ĝia statuso estas ne ankoraŭ klarigita. Ankaŭ germana teamo, estrata de Ralph Neuhäuser de la Universitato Jena, eltrovis ekzoplanedan kandidaton dum 2004. Tiu objekto orbitas junan stelon en la konstelacio Lupo, je 400 ĝis 500 lumjaroj for, nomitan *GQ Lupi*. Tiu kandidato posedas inter 1 kaj 42 MJup. Pro tiu granda malcerteco de la maso ankoraŭ ne eblis konfirmi la veran naturon de *GQ Lupi* kaj pliaj esploroj estas necesaj.

La serĉadon pri ekzoplanedoj oni daŭrigas kun fervoro. La lastaj eltrovoj montras la aktivecon de tiu astronomia fako. Anne-Marie Lagrange, teamano el la Grenobla Observatorio en Francio resumas la signifon: „Nia eltrovo reprezentas unuan paŝon al unu el la plej gravaj celoj de moderna astrofiziko: karakterizi la fizikan strukturon kaj kemian konsiston de gigantaj kaj, fine, tersimilaj planedoj”. Certe ni povas atendi aliajn ekscitigajn eltrovojn dum la estontaj jaroj.


Oliver Kim

**Stelo**: Varmega, gasa, kosma objekto, kiu generas energion per nuklea fuzio, tiel radiante lumon (nia suno estas stelo).

**Planedo**: Kosma objekto, kiu rivoluas ĉirkaŭ centra stelo aŭ bruna nano. Planedoj ne generas energion per fuzio kaj ne radias videblan lumon per si mem (nia mondo estas planedo). Ili reflektas la lumon de la centra stelo.

**Bruna nano**: Gasa objekto ne sufiĉe peza kaj varmega por ekigi plenan nuklean fuzion. Kelkaj, tamen, povas fuzii deŭterion (pezan hidrogenon).

**Ekzoplanedo**: Planedo ekster nia sunsistemo. Ĝi ne rivoluas ĉirkaŭ nia suno, sed ĉirkaŭ alia stelo.




# Inda kontribuo el la rusa literaturo

Dum mi legis ĉi tiun volumon, mi surprizite legis noveleton *Romano kun kontrabaso*. Min surprizis, ĉar antaŭ nun mi konis ĝin nur kiel komikan filmon, *Romance with a double bass*, en kiu ĉefrolis John Cleese, en 1974. La filmo tre fidele redonas la enhavon de la noveleto de Ĉeĥov. Diferencas nur, ke la filmo aldonas tre taŭgan finaĵon al la kurioze nekomplet-senta noveleto, finaĵon tiom kongruan kun la stilo kaj priskriba maniero de Ĉeĥov, ke ĝi tute senbreĉe gluiĝis al la origina rakonto. Ankaŭ kurioze estas, ke la rusa rakonto titoliĝas „romano", dum la filmo de Cleese titoliĝas „romanco". Nu, titoli la rakonton „romano" estas tipa humura ĉeĥovaĵo; kaj titoli ĝin „romanco" estas pli kongrue kun la naturo de la filmo. Tamen, mi ja demandetis al mi, ĉu eble la esperantigo de la rusa titolo estis mispresita, aŭ (tre malverŝajne, pro la tre zorga laborado de la eldonisto) eble mistraduko de la rusa.

Ĉeĥov estas plej konata de mi kiel dramisto; ke li verkis tiom da drolaj rakontetoj, mi tute ne sciis. Grandparte ili memorigas min pri la noveloj de la kanada verkisto Stephen Leacock (1869-1944), kies ĉefverkoj komencis publikiĝi iom post 1910, do proksimume 30 jarojn post la enmondiĝo de la unuaj verkoj de Ĉeĥov. Ĉu li konis la verkojn de Ĉeĥov? Tion mi tute ne scias, sed la sprita simileco estas rimarkinda.


Anton Ĉeĥov

Post granda nombro da komikaj noveletoj, Ĉeĥov komencis verki pli longajn kaj pli maldrolajn rakontojn, en kiu la komika elemento estis ĝenerale nur aludata, anstataŭ esti evidenta. Lin interesis la karaktero de homoj, grandparte la kaŝita karaktero, kontraste kun la publika karaktero. Konsekvence, paradoksoj fariĝis amata artformo lia, kiu evidentiĝas en multaj el la verkoj. Bona ekzemplo estas *Enua historio*, longa novelo pri profesoro, kiu de la publiko estas tre alte estimata, kaj kiu multe admiras sian propran fakscion, sed kies familia vivo estas preskaŭ senkohera, kaj kiu montras sin eksterordinare nekompetenta, kiam temas pri la ĉiutaga realo. Tia temo estas konata, kaj en la literaturo, kaj en la karaktero de multaj homoj, kiujn ni renkontas. Sed tiom intime kaj komplekse ĝin prezentas Ĉeĥov, ke ĝi forte trafas la animon de la leganto.


La tradukaĵoj en la volumo estas bone poluritaj kaj senescepte lerte faritaj. Pro tio la libro estas inda posteulo de la naŭ antaŭaj verkoj en la serio *Rusa Literaturo*, eldonata de Sezonoj.

Donald Broadribb

Anton Ĉeĥov: *Ĉeriza ĝardeno: rakontoj, noveloj kaj dramoj*. Eld. Sezonoj, Kaliningrado, 2004. 352 paĝoj binditaj. Neniu ISBN indikita.


**Prezo ĉe *www.retbutiko.net*: 27,00 eŭroj + afranko.**

**La libroj kaj diskoj recenzitaj en Monato estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL,**



**Frankrijklei 140,**
**B-2000 Antwerpen, Belgio.**
**Tlf. + 32 3 234 34 00;**
**tlk. + 32 3 233 54 33;**
**rete: *retbutiko@fel.esperanto.be*;**
**skajpe: fel-monato**
**aŭ per *www.retbutiko.net*.**

# La plej populara libro de la lastaj jaroj




Ŝajnas, ke tute antaŭ nelonge mi prilaboris la duan eldonon de *Vojaĝo en Esperanto-lando* por la retkatalogo *Trovanto* de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Kaj jen ĝi elĉerpiĝis, kaj jam aperis la tria eldono, en pli granda formato, rapide vendiĝanta.

Surprizas la varieco de la elektitaj tekstoj – bona enkonduko en la esperantan kulturon kun multaj ilustraĵoj. El la originala literaturo estis prenitaj multaj prozaj tekstoj (fikciaĵoj kaj eseoj pri la Esperanto-movado kaj la lingvo mem), kaj ankaŭ kelkaj poemoj. Entute en la libro aperas 109 diversspecaj tekstoj kaj du antaŭparoloj. Prezentiĝas famaj aŭtoroj, ekzemple William Auld, Julio Baghy, Marjorie Boulton, Vasilij Eroŝenko, Jean Forge, Antoni Grabowski, Kolomano Kalocsay, Ivo Lapenna, Miyamoto Masao, István Nemere, Claude Piron, Edmond Privat, Johan Hammond Rosbach, Cezaro kaj Reto Rossetti, Tibor Sekelj, Trevor Steele, Spomenka Štimec, Humphrey Tonkin, Gaston Waringhien kaj kompreneble Ludoviko Lazaro Zamenhof. Sed ankaŭ multaj aliaj, dume malpli konataj aŭtoroj, kaj originalaĵoj de la kompilinto estas prezentataj. Ekzistas ne nur tre utila alfabeta nomindekso, sed ankaŭ multaj biografiaj indikoj en la notoj.

Krom la montrado de la utilo de Esperanto, montriĝas ankaŭ indikoj pri pasintaj organizaj problemoj, ekzemple en la artikolo de Sergej Kuznecov *Danĝera libro pri danĝera lingvo* (pri la sekvoj en Rusio de la historia studo de Ulrich Lins).

La Esperanto-muzeo de Vieno aperas per artikolo el la jaro 1992, sed kun longa aktualiga komento pri la retkatalogo. Kompreneble, ankoraŭ ne eblis montri bildojn pri la nova ekspozicio en la Mollard-palaco (strato Herrengasse 9, do ne plu en Hofburg), ĉar la translokiĝo okazis nur somere de la jaro 2005, post la apero de la libro, kaj la ekspozicio eĉ fine de septembro ne estis preta. Tio restas tasko por la kvara eldono.

Ankaŭ praktikaj konsiloj troviĝas en la libro, ekzemple, kion fari, por ke la kontakto kun novaj plumamikoj bone evoluu (konsiloj de Marjorie Boulton), kaj enkonduko en Interreton. Estis ĉarma ideo de la kompilinto skribi komentojn kiel anoncojn por fikcia Esperanto-klubo.

La libro taŭgas kaj por unuopa legado kaj kiel bazo por kurso de progresintoj (la uzantoj jam regu la gramatikon kaj bazan vortprovizon). Evitante tro da neologismoj, ĝi konsiderinde pligrandigas la vortprovizon de la leganto. Eĉ spertaj esperantistoj certe trovos en la libro ion novan.

Se oni volas distriĝi, sufiĉas legi la tekstojn kaj la komentojn. Sed se oni volas vere lerni multon pri la Esperanto-kulturo, necesas legi ĉiujn notojn. Nur studinte atente la notojn, oni kapablas respondi al ĉiuj demandoj je la fino de la lecionoj.

Kiu jam konas la duan eldonon, povas konstati en la tria multajn precizigojn kaj aldonojn, valorajn por serioza studanto de la libro.

Helga Farukuoye

Boris Kolker: *Vojaĝo en Esperanto-lando: Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo*. Tria eldono reviziita, kun nomindekso, riĉe ilustrita. Eld. Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 2005. 280 paĝoj. ISBN 92 9017 088 3.

**Prezo ĉe FEL: 18 eŭroj + afranko.**



# La revo pri cirko



*La cirko de Moskvo*

Iun tagon ŝi venis al nia hejmo, kaj diris, ke ŝi volas konatiĝi kun mi. Ŝi vidis min en la televido, kiel mi prezentis miajn serpentulajn trukojn, kaj estis ravita. Ŝi, altstatura bonaspekta blondulino, havis tiam dek sep jarojn, mi – nur ok. Eble tio estis amo je la unua rigardo. Liza obsedite amis la cirkon kaj ĉion, kio iel ajn estis ligita kun ĝi. Kaj mi estis por ŝi malgranda cirka artistino, do, parto de tio, kion ŝi amis.

Cirko por ŝi estis festo, senĉesa festo, la bela ideo, por kiu ŝi vivis, la torĉo, prilumanta ŝian vivon. Por mi ĝi estis laborego, peza, ĉiutaga, de la plej frua infanaĝo. Jam kiel eta infano mi devis trejniĝi kvar-kvin horojn tage sub la severa kontrolo de mia patro. Mi malŝatis miajn trejnhorojn. Se la patro estis forveturinta, mi paŭzis, sed tiam miaj muskoloj, alkutimigitaj al certaj ŝarĝoj, doloris, postulante la necesan trejnadon. Mi estis juna talento, sed mia „pano" estis pagata per amara ĉiutaga ŝvito. Por mi la cirko estis ĉio alia ol festo.

Tiel komenciĝis nia amikeco, se oni entute povas tiel nomi niajn rilatojn. Verŝajne mi estis por ŝi samtempe fratineto, filino kaj amikino en unu persono. Ni komune vizitis sportlernejon, kie Liza trejnis sin en la nacia trampolinteamo de la respubliko, kaj mi faris miajn kutimajn akrobatajn ekzercojn, pri kiuj eĉ spertaj sportistoj miris. Ŝi kunvenigis min en kinejojn, gaste kun tranoktado al si hejmen, al siaj amikinoj kaj festoj. Kaj memkompreneble ni nepre vizitis la prezentojn de la cirkoj, kiuj gastis en nia urbo. Por tiuj okazoj ni diligente preparis nin: ni surmetis niajn plej ŝikajn vestojn, Liza kombis min aparte bele kaj zorge ŝminkis sin ... Ni ne forgesis aĉeti florojn por ŝiaj plej ŝatataj artistoj, multajn el kiuj ŝi konis laŭnome, kelkajn eĉ persone.

Kiam ŝi turneis kun sia nacia teamo en malproksimaj urboj de nia lando, ŝi sendis al mi leterojn kaj poŝtkartojn kaj, reveninte, ĉiam alportis por mi etajn suvenirojn. Mi ŝatis ŝiajn skribaĵojn pro ŝia elegante anguleca manskribo. Ĝis nun ĝi restas la plej bela skribmaniero, kiun mi iam ajn vidis.

Ni regule trejnis nin ĉe mi hejme, kaj mia patro helpis al Liza en streĉekzercoj por plibonigi ŝiajn spagatojn. Ŝi ofte tranoktis kaj manĝis ĉe ni, iĝis por ni kvazaŭ familiano. Mi memoras, ke plej multe en la mondo ŝi ŝatis kuketojn kun konfitaĵo, kiujn majstre fritis mia patrino.

La revo de Liza estis la mondkonata moskva cirko, ŝi nepre volis iam elpaŝi kiel trampolinsaltanto en la areno de tiu cirko. Tio estis ŝia dezirego, ŝia celo, ŝia ĉio. Iun tagon ŝi vojaĝis al Moskvo por elprovi siajn fortojn kaj ŝancojn. Ŝi neniam plu revenis en nian urbon. El ŝiaj leteroj ni eksciis, ke post multaj klopodoj ŝi sukcesis ricevi lokon en la trampolina trupo de la moskva cirko. Sed dum unu el la unuaj prezentadoj, farante duoblan mortosalton, ŝi krude falis kaj rompis al si unu gambon. Labori en cirko ŝi ne plu povis. Ankaŭ el mia cirka kariero finfine nenio rezultis.

Jarojn poste, dum kelktaga restado en Moskvo, mi renkontiĝis kun Liza. Ŝi loĝis kune kun sia plenkreska filino. La rilatoj inter ili estis streĉaj. Ili tute ne komprenis unu la alian, eĉ ne provis tion. Kaj dum iu momento mi pensis, ke la tutan amon, kiun devus ricevi ŝia filino, ricevis iam mi ...

Ni sidis en ŝia ĉambro kaj interparolis, Liza montris al mi novan videofilmon pri la fama ĉina cirko. Ĝis nun la cirko restas ŝia plej forta pasio. Mi sentis min tiel, kvazaŭ nenio ŝanĝiĝis dum tiuj kelkaj jardekoj, kvazaŭ ni neniam disiĝis ...

Ĉe la adiaŭo ŝi diris al mi: „Ĉu vi scias, ke mi neniam povis forgesi la kuketojn kun konfitaĵo, kiujn fritis via patrino? ..."

Lena Karpunina

# ANONCETOJ

**Esperanto-instruistoj**: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

**Korajn gratulojn, paĉjo**, okaze de via 60a naskiĝtago!!! Vivu longe kaj feliĉe! Viaj dankemaj Karlo kaj Anna.

**LA GAZETO** estas revuo mondkultura, sendependa, esperantisma. Petu provnumeron de La Gazeto, F-55210 Creue (Francio). Rete: lagazeto@osiek.org - www.lagazeto.com.

**... jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj personoj 25-55-jaraĝaj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo “Knajpo”. Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

**“Naturista Vivo”,** la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provekzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fö u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

**Kreu vian propran librokatalogon**! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de la verkoj de Jorge Camacho aŭ de Sikosek? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de *La ŝtona urbo*? Ĉio tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.


## La ondo de esperanto

LA ONDO DE ESPERANTO

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

Abonebla kontraŭ

27 EUR ,
30 USD aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj.

* Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
* Tra Esperantujo
* Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
* Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
* Historio kaj kulturo de Esperanto
* Recenzoj pri la novaĵoj de la libromerkato
* Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
* Literatura suplemento jarfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

## La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista

4 numeroj jare + La Krom

lkk@free.fr

**REGULAJ KUNLABORANTOJ:**
***Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.***



**Abono: 22 €**
**(EKDE 14 EN KELKAJ LANDOJ)**
**Jacques Le Puil,**
**pĉk 12 729 73 X Paris**
**aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp**

## Komencanto

komencanto@r66.ru

**“Komencanto”**

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj.
Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj …


Regule aperas ekde 1998 — Formato A4, 16 paĝoj

Abontarifo: **15 eŭroj**
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo: www.Komencanto.narod.ru

Abonu ĉe UEA
aŭ ĉe via landa peranto

Poŝta adreso: KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg, 620041 Rusio



www.retbutiko.net
Vagu laŭplaĉe inter la verkoj de la Retbutiko.
Bonvenon en la Esperanta Retbutiko!
Elektitaj eroj
Kategorio
elektu la specon kiun vi deziras
Kvanto
skribu tie ĉi la kvanton, se vi deziras mendi
Bildo
kun fotoj de la plej gravaj verkoj
Detaloj
pliaj detaloj kiel eldonjaro, paĝnombro, priskribo, ktp.
Recenzo
legu recenzon pri la verko
www.retbutiko.net
1996-2006
La retbutiko
10 jara!